

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

**MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ
LA GAZETO ESTAS FIDELA AL LA BULONJA DEKLARO.**

„Esperantystą jest każdy, kto zna język „Esperanto“ i używa go dla jakichbądź celów“.
DEKLARACJA BULOŃSKA.

„Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas“.
BULONJA DEKLARO.



„Sądzimy, że służąc naszej Ojczyźnie, Esperanto najlepiej służyć będzie sobie“.
DEKLARACJA POZNAŃSKA.

„Ni kredas, ke servante nian Patrujon, Esperanto plej bone servos sin mem“.
POZNANJA DEKLARO.

E N H A V O :

Baroko: Sub verda mantelo. — **Antoni Lange:** La nuntempa pola literaturo. — **Stanisław Braun:** Migranto. Kanto. — **Zygmunt Krasiński:** El „Ne-Dia Komedio“ (trad. Br. Kuhl). — **Mieśląc esperanckí.** — **Libroj kaj gazetoj.** — **Komuniko.**

ELDONA SOCIETO
„POLA ESPERANTISTO“

KOMP. KUN LIM. RESP.

WIDOK 19, WARSZAWA, POLUJO.

AKCEPTAS LIBROJN,
PROPAGANDILOJN KAJ ALIAJN
ESPERANTAĴOJN POR KOMISIA VENDADO.

Ĉiu

literaturamanto
propagandisto
serioza esperantisto

abonu
la monatan, bele ilustritan revuon

Literatura Mondo

Redakcio kaj Administracio:

Budapest VI, Andrassy ut. 81.

Jarabono (12 numeroj) 10 fr. sv.


POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

**MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ
LA GAZETO ESTAS FIDELA AL LA BULONJA DEKLARO**

„Esperantystą jest każdy: kto zna język „Esperanto“ i używa go dla jakichbądź celów“.
DEKLARACJA BULOŃSKA.

„Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas“.
BULONJA DEKLARO.



„Sądzimy, że służąc naszej Ojczyźnie, Esperanto najlepiej służyć będzie sobie“.
DEKLARACJA POZNAŃSKA.

„Ni kredas, ke servante nian Patrujon, Esperanto plej bone servos sin mem“.
POZNANJA DEKLARO.

.....

JARO XVIII — 1924.

.....

TABELO DE ENHAVO. DE LA REDAKCIO.

	Paĝo.
B. m. Klara Zamenhof	129
„ Esperanto “ respondas	13
„ Litova Stelo “	12
Litovujo kaj Polujo. Respondo de la Pola Registaro	97

POLLANDA FAKO. .

Augustyniak Jan: Bibliotekoj en Polujo	25
„ „ La Publika Biblioteko en Łódź	107
Kostecki Jan: Henryk Sienkiewicz	105
Lange Antoni: La nuntempa pola literaturo (1863—1923)	36
Piĝłowski Karol: Stefan Żeromski	21
„ „ Wacław Sieroszewski	105
Starzyński Artur Dr: Skizo de historia evoluo de pola sanitara leĝaro	135
Wittlin Józef: Pri la moderna pola poezio (1914—1924)	132

ESPERANTISMO.

Alvoko al ĉiulanda esperantista studentaro	158
Baroko: Sub verda mantelo	33
Bujwid Odo Prof: Por memoro pri Klara Zamenhof	130
Czubryński Antoni Dr: Parolado dum la V Kongreso de Pola Esperanto-Asocio en Warszawa	110
Esperanto w medycynie	29
Kostecki Jan: Kelke da vortoj al ĉiuj verdaj amikoj — kaj ankaŭ al ĉiunverduloj ,	19
„ „ Kio okazis en Wien	81
T. K: Język Esperanto a słownictwo naukowe	17

P O E Z I O .

Braun Stanisław	Al suno !	118
„ „	Balado pri aspiranta poeta embriaro	57
„ „	Gruoj	58
„ „	Kanto	35
„ „	La vojo	118
„ „	Mi ĉizis	89
„ „	Migranto	35
„ „	Vojou serĉas mi	89
Karolczyk Stanisław	Sopiro	11
Kozłowski Czesław	Tataro en malliberejo	116
Niemcewicz J. U.	La kursoj en koto (trad. Józef Orzech)	59
St. Br.	El la intimaĵoj de Lodz'a Esperantujo. I.	
	Lamenta babilado pri nenio	138
Tetmajer Kazimierz	Mi ŝatas (trad. Br. Kuhl)	59

L I T E R A T U R O .

Adamowicz Bogusław	La eskima stango (trad. T. K.)	140
Dygasiński Adolf	Hunda sorto (trad. Br. Kuhl)	61
	El la pensoj de Bolesław Prus (esperantigis K.)	137
Hempel Helena	La parazitaj meteoroj	49
Krasicki Ignacy	Bajraĥ kaj liaj sentencoj (trad. Hempel)	4
Kraŝiński Zygmunt	El „Ne-Dia komedio“. Parto	
	tria. Lasta sceno. (trad. Br. Kuhl)	41
„ „	El „Ne-Dia komedio“. Parto kvara.	
	Lastaj scenoj (trad. Br. Kuhl)	119
Niemojewski Andrzej	La hundo de Fenicio (trad.	
	Włodzimierz Pfeiffer)	142
Pigłowski Karol	Impresoj	85
Siemieński L.	Pri la valoro de popolaj tradicioj (trad.	
	Helena Hempel)	8
Sienkiewicz Henryk	Saĥem (trad. Dr. Ignacy Dziedzic)	148

K R I T I K O K A J B I B L I O G R A F I O .

Kostecki Jan	Dua libro de Forge	125
	Libroj kaj gazetoj	15, 16, 64, 96
	Ricevitaj gazetoj	31, 128

KRONIKO KAJ KOMUNIKOJ.

Ekzamenoj dum nia V Kongreso	14
Komunikoj:	48, 79, 127, 160
Kroniko:	14, 30
V Kongreso de Pola Esperanto-Asocio en Warszawa	109
„ „ „ „ „	Dua komuniko 27
La XVII Kongreso en Ĝenevo	155
Miesiąc esperancki:	47, 77, 93, 157
Pola Esperanto-Asocio por Zamenhofa Monumento	32
Polska na XVI Kongresie esperanckim w Wiedniu	92
Por Zamenhofa Monumento	80
Preseraroj	80
Sprawozdanie Zarządu Polskiego Towarzystwa Esperantystów za rok 1923	1
Uczestnik: La Zamenhofa Tago	131



POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

JARO XVIII.

WARSZAWA — MAJO 1924.

N^o 5 (103)

Sub verda mantelo.

En Rumanujo okazis proceso kontraŭ Esperantistoj! En la pola parlamento oni jam dufoje interpelaciis pro laŭdiraj persekutoj de niaj „samideanoj“. Fine konata estas la mal-simpatio, kiun en la lastaj jaroj eksentis al Esperanto la sama registaro, kiu post la kongreso en Boulogne dekoraciis nian Majstron per la Honora Legio.

Kia estas la kaŭzo de tiuj fenomenoj? Kiel povas la registaroj rigardi suspekteme la standardon, sur kiu per grandaj literoj skribita estas la vorto „Neŭtraleco“?

Iom atenta observado de diversspecaj agadoj de la Samideanoj konvinkigas, ke ili ofte mem estas kulpaj pri tio. Kun bedaŭro oni rimarkas, ke kelkaj rondoj tro libervole klarigas al si la paragrafon de l'Boulogne'a deklaro dirantan, ke „Esperantisto estas ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanton tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas“ kaj ke tiu uzado estas „lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas“.

Oni povis en la lastaj tempoj rimarki, ke kelkloke oni trouzis tiun tute ĝustan principon kaj el la Verda standardo faris mantelon, sub kies basko oni provis kaŝi pli aŭ malpli malproksimen irantajn celojn. Oni fondadis Esperantistajn societojn kaj rondojn, kiuj kun Esperanto havis komunan ofte nur la nomon kaj sub tiu firmo, facile enregistriĝebla pro la konata — ankaŭ al la registaroj — neŭtraleco, aranĝadis propagandon de celoj ne ĉiam por diversaj registaroj oportunajn aŭ agrablajn. Tial ne estas mirinde, ke ili reagis komence kontraŭ tiuj rondoj kaj ofte poste kun la akvo elverŝas el la bankuvo la infanon farante malagrablaĵojn al ĉiuj Esperantistoj.

Sed tiaj malfacilaĵoj flanke de la registaroj ne tiom estas malutilaj kiom la sekvoj, je kiuj Esperanto post tiaj „skandaloj“ estas elmetita en la opinio de la larĝaj publikaj rondoj. Polica revizio aŭ eĉ juĝa proceso gajnita aŭ malgajnita de kelkaj nerespondecaj individuoj estas ankoraŭ malgravaĵo; pli grava estas, ke gazetistoj fuiras el tio ofte supeton ne tre digesteblan de la senkritika publiko, kiu ĝeneraligante iun fakton opinias, ke Esperanto estas danĝera, detruiga ideo, kiun oni devas kontraŭbatali, sufoki, persekuti k. t. p. Kaj tiel danke al kelkaj facilanimuloj aŭ eĉ homoj, por kiuj Esperanto estas afero plene indiferenta kaj ofte... ne tre konata, kelkjara laborado de multaj fervoraj Samideanoj en kelkaj tagoj disfalas kiel dometo el ludkartoj; la laboron oni devas rekomenci en multe pli malfacilaj kondiĉoj.

Kiom tia „uzado tute egale, por kiuj celoj“ povas esti malutila, por Esperanto, pruvas la spertoj el la granda milito. En unu el la militantaj ŝtatoj la esperantistoj pro patriotismo eldonadis bultenon, cetere de la registaro subtenatan, en kiu ili penis propagandi en la neŭtralaj ŝtatoj la aferojn de sia patrolando. Ĉu oni povas al si imagi pli belan uzon de Esperanto? Komprenis tion la Esperantistaro en ĉiuj landoj simpatiantaj kaj eĉ ne simpatiantaj kun tiu ŝtato kaj ĝojis pro la nova pruvo de l' taŭgeco de nia ideo „por ĉiuj celoj“... Tamen la sekvoj de tiu „uzado“ sentas nun post kvin jaroj sufiĉe suferige nia afero en la kontraŭa ŝtato; ĝia registaro kaj, kio estas pli grava, la granda multo da ĝia loĝantaro strabe rigardas Esperanton, kiel aferon malutilan, ĉar... ĝi estis uzata de la kontraŭuloj.

La verdstela popoloeto estas facile entuziasmiĝema. Ĉiu nova fakto ĝin ĝojigas, ĉiun novan gazeton, broŝureton, grupeton aŭ paroladeton ĝi bonvenigas per aplaŭdoj. Tiun fakton elprofitas ofte homoj senskrupulaj, kiuj ĉe nia fajro deziras rosti sian manĝaĵon.

Tial konsilinda estus iom pli granda dozo da kritikemo en prijuĝado de niaj simpatiuloj en la nomo de l' proverbato: Dio gardu min de amikoj, ĉar de malamikoj mi mem min defendos. Kaj iom pli multe da kritikemo en la prijuĝado, ĉu la formo en kiu oni intencas propagandi Esperanton aŭ ĝin uzi por iuj celoj, estas taŭga!

Baroko.



Migranto.

*Tra disvojoj mi iros en stepojn, dezertojn,
Ĉe ni ĉio sufokas kaj premas al tero!
Tra disvojoj mi iros al spac' kaj libero
Serĉi novajn ekscitojn, serĉi novajn spertojn.*

*De la kor' mi forŝiris avidajn lacertojn,
Kiu sorbas el koro sangon de l'espero —
Mi forturnas la kapon de tera mizero
Kaj foriras eltondri gigantajn koncertojn:*

*Mia kanto nun estu kant' de l'uragano,
Amo mia — aglida flugo subĉiela,
Kiel roko granita — estu mia mano*

*Kaj paŝo, kiel tondro — estu senŝancela!..
La kredo mia estu la morton venkanta
Kaj sopiro — lazurojn senlimajn celanta!*

Stanisław Braun.

Kanto.

*La harpon mi etendis ĝis nuba zenito,
En ĉielan arkaron batas la ekkrioj...
Sur harpo sun' petolas per oraj radioj
Kaj mira kant' respondas — kanto de Spirito.*

*En brusto mia floras la mistera Mito
Pri la kantoj sopiraj, kiel astraj strioj,
Kaj singulte al grandaj, kosmaj melodioj
Eĥas la kant' fiera de ter' forpelito.*

*La harpon mi etendis ĝis steloj, ĝis suno!
Disflamiĝos ĝi eble en ardo radia,
Rigidiĝos en pala arĝento de luno*

*Aŭ pereos en spacoj kanto de animo...
Kaj lazuro serena restos, silentpia.
Kaj denove kvieto regos en Senlimo.*

Stanisław Braun.

La nuntempa pola literaturo. (1863—1923).

La jaro 1863 estis epokfaranta en la pola politika vivo kaj en la pola literaturo. La lasta nacia ribelo kontraŭ la Rusoj finiĝis per malvenko. La pola nacio, kiel poste montriĝis, ne posedis sufiĉe da fortoj, por batali kun tiel potencaj organizaĵoj, kiel Rusujo aŭ Prusujo. Alvenis la „sabriĝo“, kiel oni tion nomis. Kaj ĉiajn ribelojn oni malbenis.

Vekiĝis la rezignacio, la paciĝo kun la sorto, vekigi la tendenco elprofiti por la bono de l'nacio la situacion, en kiun la sorto metis la landon. Ĉiujn ribelajn ideojn oni nomis Don-Kiĥotaj. Ekregis en la lando la realista kompreno de l'vivo. Tiutempe Okcidente populariĝanta filozofio de Comte, i. n. pozitivismo, fariĝas la principa devizo de gvidantaj grupiĝoj.

Post la falo de Napoleono III, de kiu oni multe esperis, kaj post la franca malvenko en jaro 1870 — disvolviĝis en Polujo movado, nomata *pozitivismo*, kies negativa devizo estis la batalo kun la romantismo kaj la ribelideoj; la celo de tiu movado estis anstataŭi la metafizikon per koncizaj sciencoj, la revojn per agado, la poezian romantismon per praktika vivo. La industrio kaj komerco, la konkirado, de grandegaj orientaj merkatoj (Rusujo), fine la formiĝado de riĉa urbanaro aŭ burĝaro — jen estis la ĉefaj direktivoj de nova generacio post la malvenkoj en jaroj 1863 kaj 1870, ĉar ambaŭ tiuj malvenkoj ligiĝis unu kun la alia.

Tiutempe fondiĝis *La Semajna Revuo*, kiu kuraĝe ekstaris sur la fundamento de pozitivismo, kontraŭbatalante la romantismon. Ĉirkaŭ la revuo ariĝis grupo de tre talentaj junaj verkistoj, kiuj baldaŭ okupis la unuan vicon en la literaturo; komence ili marŝis kune, sed iom poste ĉiu el ili ekiris propran vojon. Gvidanto de tiu junularo estis *Aleksander Świętochowski*, eminenta publicisto kaj polemikisto, kaj samtempe aŭtoro de perfekte stilizitaj tragedioj (*La senkulpuloj*, *Patro Makary*, *Aspazio k. a.*) — kiu dum longa tempo vekis raron inter la junularo.

Apud li aperis kritikistoj, kiel *Piotr Chmielowski* kaj *Włodzimierz Spasowicz*, kaj verkistoj, kiel *Bolesław Prus*, *Henryk Sienkiewicz*, *Eliza Orzeszko*: ĉiu el ili siamaniere enkondukadis en la romanon ideojn pozitivistajn, demokratajn, popolurbanajn. Sed Prus plivastigis siajn ideojn kaj beligis siajn romanojn per profunda Dickens'a humoro; Eliza Orzeszko desegnis

diversspecajn tipojn de jugitoj kaj tipojn de litovpola malgrand-nobelaro; Sienkiewicz forlasis la pozitivismon kaj en la *Trilogio* (*Per fajro kaj glavo, La diluvo, Sinjoro Wołodyjowski*), en *Quo vadis?* revenas al romantismo, forlasante ĝin tamen en *La familio Potaniecki*, kie li denove revenas al la idealoj de l'pozitivismo. Henryk Sienkiewicz akiris tutmondan famon.

Oni ne devas forgesi, ke tiutempe vivis ankoraŭ pli maljunaj aŭtoroj, kiel ekz. *J. J. Kraszewski*, kiu ligis en siaj verkoj la ideon de sendependeco kun la celadoj pozitivistaj (*Resurrecturi*); *Teodor Tomasz Jez*, malnova ribelano (de jaro 1848), loĝanta en Ĝenevo, unu el la promotoroj de demokracio kaj libera penso. Estis krome aliaj tre kapablaj verkistoj, ekz.: *Michał Bałucki, Jan Zacharjasiewicz, Sewer Maciejowski* la ironisto *Jan Lam, Klemens Junosza*.

La poezio iĝis cindrulino, kaj malgraŭ ke vivis ankoraŭ pli maljunaj poetoj (*Cyprjan Norwid, Deotyma, Felicjan Faleński, Leonard Sowiński, Kornel Ujejski*) — ili estis tamen malmulte konataj. Kaj nur malrapide naskiĝas nova grupo de poetoj, kiuj sciis kunigi en si altan inspiron kaj novtempajn tendencojn.

Tio estis antaŭ ĉio *Adam Asnyk*, profunda pensulo, laŭ formo parnasulo; *Wiktor Gomulicki*, eleganta cizelisto kaj artisto de l'vorto, ĝis iu grado realisto — kaj fine *Maria Konopnicka*, kiu per virina instinkto gvidita sciis ofte alpreni tonon de vera aŭgurino.

En teatro kontraŭe — ekregis la stilo de franca komedio laŭ Sardou kaj Dumas filo. Tiel skribis *J. Sarniecki, K. Zaleski, E. Lubowski, Narzymiski*. Pli hejmaj estis la motivoj de *Bliziński* kaj *Bałucki*. Kontraŭe *Fredro* (filo) falas en farson. Kelkaj pli aĝaj verkistoj skribas ankoraŭ historiajn scenaĵojn, sed nur *St. Kozłowski*, kies unua teatraĵo *Alberto vokto* akiris bonan sukceson — denove enkondukas la poezion en teatron.

Ankaŭ la pentrarto ne evitis la influojn de realismo kaj pozitivismo: *St. Witkiewicz*, per sia libro *La arto kaj kritiko ĉe ni* — iĝis la socion al pensado pri aferoj de l'arto. Liaj pentraĵoj, kiel ankaŭ tiuj de fratoj *Gierymski*, de *St. Mastowski* kaj aliaj, reprezentis en la pentrarto t. n. naturalismon.

Ankaŭ en romano ekregis la periodo de naturalismo, kiun reprezentas *Gabryela Zapolska*, senkompara pentristino de sociaj profundaĵoj kaj suferoj de virino, penetrema kaj kuraĝa en redeseĝno de la efektivo kaj samtempe tre bona sceneja aŭtorino; *Adolf Dygasiński*, kiu kun amo priskribas la vivon de vilaĝanoj, estante krome bonega pentranto de bestoj, precipe hundoj; *Wacław Sieroszewski*, kiu dank' al sia longa restado en Siberio ekkonis profunde la vivon de Jakutoj, famiĝis kiel pola Kipling, pentristo de malproksimaj landoj, kaj poste kiel kreinto

de romano kun batala karaktero; fine *Władysław Reymont*, kiu eternigis sian nomon per la kvarvoluma epika verko *La kamparanoj*, en kiu la vivo de pola vilaĝano estas prezentita en ĉiuj detaloj kaj momentoj.

Sed jam ĉe *Konopnicka*, *Sienkiewicz*, ĉe *Sieroszewski*, *Reymont* ni vidas deflankiĝon de la puraj principoj de pozitivismo. Tiuj principoj elĉerpiĝas: ili jam tro disvastiĝis kaj iĝis plataj kaj vulgaraj.

La pli maljuna generacio elkreskis meze de fajro de la malvenko; ĝi ekmalamis do ĉian ribelon, konspiron, insurekcion. Novaj homoj elkreskis ekster tiu malfeliĉo; iliaj nervoj akiris forton. La pozitiva laboro (t. e. industrio kaj kapitalismo) — vokis al vivo novan sferon, la laboristojn, kies metafiziko estis socialismo kaj socia revolucio. De alia flanko la socialismo komencis idealigi la ribelon. Nova ondo de konspiro ekmovis la homajn animojn. Aperis la nova kamparano, diferenca de tiu de antaŭ la jaro 1863. La pozitivismo estis mortigata iom post iom per la frapoj de nova idealista filozofio. La animoj komencis pleniĝi per novaj sopiroj, novaj flugoj en senfinecon, unuvorte — per nova romantiko.

La poezio de *Juljusz Stowacki*, kaj precipe lia *Reĝo-Animo* kaj aliaj postmortaj verkaĵoj — fariĝis la fajrujo de novaj inspiroj. De unu flanko aperas revuo *La Voĉo*, kies gvidantoj *Jan Poptawski*, *Józef Potocki* k. a. anoncas la kredon al la „popolo“, kiel forton, kiu donos al Polujo la sendependecon; sur la emigracio aperas socialistaj gazetoj (*Matenruĝo*, *Veksignalo*), kiuj anoncas socian revolucion. Fine en Warszawa en jaro 1888 *Zeŝon Przesmycki* (*Miriam*) fondas revuon *La Vivo*, organon dediĉitan al la poezio, kiu devas denove akiri voĉon. *Miriam*, posta redaktoro de grandioza monata revuo *Ilimero* penis arigi ĉirkaŭ la *Vivo* tiujn, kiuj estis antaŭsentantaj, ke venis nova periodo de granda poezio. Ĝi estis iel la momento, kiam en Francujo ekfloris la simbolismo kaj komenciĝis la riĉa epoko de grandioza poezia kreado.

Miriam ne eraris: en daŭro de lastaj dekelk' jaroj aperis en Polujo nova periodo de poezio, kiun oni kuraĝe povas nomi argenta aĝo, se la periodon de *Mickiewicz* ni nomos aĝo ora. Falango de brilaj neĉiutagaj talentoj aperis sur horizonto: *Jan Kasproicz*, *Kazimierz Tetmajer*, *Or-Gt* (*Oppman*), iom pli aĝa *Kazimierz Gliński* (pura romantikulo), *Jan Lemański*, *Andrzej Niemojewski*, (poste fama publicisto), *Jadeusz Miciński*, *Leopold Staff*, *Bolesław Leśmian*. Ne ĉiuj el ili en egala grado, sed ĉiuj tiel aŭ alie — donis novan formon kaj novan animon.

Dume la varsovia *Vivo* ĉesis aperadi kaj en j. 1897 komencis *Ludwik Szczepański* la eldonadon de *Vivo* en Kraków. Tiu ĉi revuo komence eklektika — fariĝis poste centra organo de t. n. Juna Polujo. La principan direkton al la krakova *Vivo* donis *Artur Górski*, kiu sintezigis en si la idealojn de grandaj poetoj romantikaj kaj alkonfirmigis iliajn pensojn al la novaj tempoj (*Monŝalvato, Kien celis Polujo*). Kio en prozo estis *Artur Górski*, tio estis en la poezio *Stanisław Wyspiański* — pentristo kaj drama poeto — la heredinto de l'animo de la granda Triunuo (*Mickiewicz, Słowacki, Krasiński*), kiu sciis la nuntempan Polujon ensorĉi en formulojn, inspire egalajn al la genio de l'epoko romantika. Liaj scenaĵoj, kiel *La malbeno, Edziĝfestoj, Liberigo* k. a. — apartenas al la plej multprezaj perloj de nuntempa pola literaturo. *Górski* kaj *Wyspiański* redaktis la krakovan *Vivon*, al kiu baldaŭ aliĝas la el eksterlando veninta *Stanisław Przybyszewski*. Komence li verkis germane (*Chopin kaj Nietzsche, Meso de mortintoj*) en Berlin, ravante tie Germanojn kaj Skandinavojn, nun li aperis en Kraków, por ravi la samlandojn.

En kontraŭo al la saturitaj per nacia tradicio verkistoj, kiel *Górski* kaj *Wyspiański* — li alportas kun si iom da kosmopolita kaj universala spiro. Lia *Confiteor*, kiu proklamis la arton por la arto kaj la absoluton — skuis por kelke da jaroj la Junan Polujon. Kaj kvankam la esenco de la absoluto montriĝis *sexus*, longe ankoraŭ ĉiuj kredis, ke ĝi efektive estas la absoluto. *Przybyszewski* estis individuo forta kaj armita per granda talento, precipe drama. Liaj scenaĵoj, kiel *Pro felico, La ora saflano, La neĝo*, k. a. narkotis la aŭskultantojn. Ankaŭ liaj unuaj romanoj — *Ĥomo sapiens, Infanoj de l'satano* havis grandan sukceson.

Sed baldaŭ kovris *Przybyszewski*'n verkisto, kiu, havante la samam kiel *Przybyszewski* forton en la pentrado de erotikaj problemoj, sciis trovi ankaŭ aliajn valorojn ekster tiu absoluto. Verkisto tiu estas *Stefan Żeromski*, inter la vivantaj polaj verkistoj — sendispute la plej granda. Senkompara, kiel novelisto — li skribis ankaŭ multajn romanojn (*Ĥomoj senĥejmaj, Sizifaj laboroj, Cindroj, Ĥistorio de l'peko*), kie ĉiujn suferojn de sia popolo li pentras kun sentema koro kaj senkompata realismo.

Ankoraŭ antaŭ la morto de *Wyspiański* (1907) malfortiĝis la vivo literature-kritika en Kraków. Ĝi estis la tempo de rusa-japana milito kaj de rusa revolucio. En la sama tempo ĉesis aperi la varsovia *Ĥimero*, kiun fondis *Miriam* en j. 1900, kaj kiu sukcesis arigi ĉirkaŭ ĝi multajn junajn talentojn, inter kiuj distingiĝis *Wacław Berent*, aŭtoro de kelke da romanoj, kiel *Putraĵo, Vintra semajo, Vivaj ŝtonoj*. Neunu juna poeto provis tie siajn unuajn paŝojn.

La aŭtoritato de simbolismo kaj ĥimerismo estis subfosa per nova homo, kies destino estis fariĝi granda edukisto de la juna generacio. Tiu homo estis *Stanisław Brzozowski*, pensulo plena de energio, banita en Nietzsche, Marx, Shelley, Bergson, James, Sorel, laste konvertita je katolicismo sub influo de Vico, de Sanctis, Ben. Croce kaj aliaj italaj verkistoj. Sur lokon de ideologio — li enkondukas *la vivon* kaj kiel ĝia anoncanto, li batalas kun la Simbolo. Filozofo, kritikisto, historiisto de literaturo, li publikigis kelke da verkoj, kiel *Voĉoj dum nokto*, *La legendo de Juna Polujo*, *Memorlibro*, kiuj kondukas la penson sur tute novajn vojojn. Li skribis ankaŭ romanojn (*Flamoj*).

El aliaj verkistoj indas esti menciitaj: *Gustaw Daniłowski*, kiu tro imitas *Zeromski*'n; *Józef Weyssenhof* — pentristo de aristokrataj sferoj; *Zygmunt Bartkiewicz*, *Tadeusz Jaroszyński*, *Zofja Rygier-Natkowska* kaj aliaj.

Ankaŭ en teatro aperis kelke da interesaj verkistoj, kiel: *Morstin Rostworowski*, *Adam Siedlecki*, *Br. Winawer*, *Lucjan Rydel*, *J. A. Kisielewski*, *A. Nowaczyński*, *Jerzy Żuławski*, *C. Rittner*, *Wł. Perzyński*, *J. Szaniawski*, *W. Grubiński*.

Dume venis aliaj tempoj. Ektondris la milito (1914—1920) kaj el tiu milito eligis la liberigita Polujo. Dum la milito oni multe poeziis: aperis grupo de militaj poetoj, inter kiuj distingigis *J. Mączka*. Semtempe oni teoriis: tamen evidentigis, ke ne estas ebla kreo de nova arto, nek dum la milito, nek dum la postmilita ĥaoso en kiu ni vivas. Por tio estas bezona nova homo, kaj tiu nova homo aperos nur post dudek jaroj. Dume oni akceptis pretajn, el eksterlando alportitajn literaturajn kanonojn antaŭmilitajn: precipe la futurismo—de unu flanko la itala, de alia—la rusa bavis grandan influon sur la postmilitan polan poezion.

Kiel futuristoj aŭ formistoj elpaŝis novaj, tre lertaj versistoj, grupigitaj ĉirkaŭ la revuo *Skamandro*: *Juljan Tuwim*, *Jan Lechoń*, *Ų. Wierzyński*, *A. Stoniński*, *J. Jwaszkiewicz*. Oni devas esperi, ke tiu nova generacio havas antaŭ si la efektivan eblon de evoluo. En teatro ili faris malmulte: tio kion donis *St. Jerzy Witkiewicz*—estas strangaĵo, ne arto.

Ekzistas tamen multaj aŭtoroj, kiuj ne serĉas „novajojn“ à outrance, sed donas verkojn solidajn, valorajn: *Piotr Choynowski*, *Andrzej Strug*, *Walewska-Wielopolska*, *Ĥaden-Bandrowski*.

La pola literaturo troviĝas hodiaŭ en atendo. Ĝi devas solvisian principan problemon: la rilaton de l'poezio de nova liberigita Polujo al la granda romantismo de Polujo katenĉenita.

Antoni Lange.

Zygmunt Krasiński.

El „Ne-Dia komedio“.

Patro tria. Lasta sceno.

Salono longforma — portretoj de sinjorinoj kaj kavaliroj pendas sur la muroj — profunde kolono kun blazonŝildo — Viro sidas ĉe marmora tableto, sur kiu kuŝas lampo, paro da pistoloj, sabro kaj horloĝo — kontraŭe dua tableto, arĝentaj vazoj kaj pokaloj.

VIRO. Iam je la sama horo meze inter minacantaj danĝeroj kaj similaj pensoj, al Brutus montriĝis la Genio de Cezar.

Kaj mi hodiaŭ atendas similan vizion. — Post momento stariĝos antaŭ mi homo sennoma, sen antaŭuloj, sen anĝelgardisto kiu eliris el nenieco kaj komencos eble novan Epokon, se mi lin returnen ne forpuŝos, ne faligos en neniecon.

Patroj miaj, inspiru min per tio, kio vin faris sinjoroj de l'mondo — ĉiujn leonajn korojn donu al mi en la bruston — seriozo de tempioj viaj kovru mian frunton. — Kredo je Kristo kaj Lia eklezio, blinda, senpardona, bolanta, inspiro de viaj verkoj surteraj, espero de l'gloro en ĉielo, malsupreniru al mi, kaj la malamikojn mi mortigados kaj bruligos, mi, filo de cent generacioj, lasta heredanto de viaj pensoj kaj kuraĝo, de viaj virtoj kaj eraroj.—

(Batas dekdua horo)

Nun mi estas preta. — *(leviĝas)*

SERVISTO ARMITA. *(enirante).* Via Sinjora Moŝto, la homo, kiu estas venonta, atendas. —

VIRO. Li eniru. —

(La servisto eliras)

PANKRACO. *(enirante).* Mi salutas Grafon Henrikon. — Tiu vorto Grafo strange sonas en mia gorgo. —

(Li sidiĝas — formetas la mantelon kaj ĉapon de Libereco kaj fikse rigardas kolonon, sur kiu pendas blazono.)

VIRO. Mi dankas vin, ke vi konfidis al mia domo — laŭ malnova kutimo mi trinkas je via sano. — *(prenas la pokalon, trinkas kaj donas al Pankraco).*

Gasto, en viajn manojn. —

PANKRACO. Se mi ne eraras, tiuj insignoj ruĝaj kaj bluaj estas nomataj Blazono en la lingvo de l'mortintoj. —

VIRO. Kun Dia helpo, baldaŭ milojn da ili vi vidos. —

PANKRACO. (*formetante la pokalon de la buŝo*) Jen malnova nobelaro — ĉiam certa pri si — fiera, obstina, floranta per espero, kaj sen groŝo, sen armiloj, sen soldatoj. — Minacanta, kiel fabela mortinto al veturigisto ĉe l'pordo de tombejo — kredanta aŭ simulanta kredi je Dio — ĉar je si malfacile estas kredi. — Sed montru fulmotondrojn senditajn al via defendo kaj anĝelajn regimentojn el ĉielo. — (*trinkas*)

VIRO. Ridu je viaj propraj vortoj. — Ateismo estas malnova formulo — kaj mi esperis ion novan de vi. —

PANKRACO. Ridu je viaj propraj vortoj. — Mi havas kredon pli fortan, pli gigantan ol la via. Ĝemo pro malespero kaj doloro elŝirita al miloj da miloj — malsato de metiistoj — mizero de vilaĝanoj — malhonoro de iliaj edzinoj kaj filinoj — humiliĝo de l'homaro subpremita per superstiĉo, hezitado kaj bruta alkutimiĝo — jen kredo mia — mia Dio por hodiaŭ — jen penso mia — jen potenco mia, kiu panon kaj honoron al ili disdonos por eterne. — (*trinkas kaj jetas la pokalon*)

VIRO. Mi metis mian forton en Dio, kiu al miaj Patroj donis la regadon. —

PANKRACO. Kaj tutan vivon vi estis ludilo de l'diablo. — Cetere mi lasas tiun disputon al teologoj, se iu pedantulo de tiu metio vivas ankoraŭ en la tuta ĉirkaŭaĵo; — al la afero — al la afero. —

VIRO. Kion do vi postulas de mi, savinto de popoloj, civitano — Dio? —

PANKRACO. Mi venis ĉi tien, ĉar mi deziris vin ekkoni — kaj savi. —

VIRO. Dankon por la unua — la duan lasu al mia sabro.

PANKRACO. Sabro via — vitro, Dio via — fantomo. Kondamnita vi estas per voĉo de miloj — ĉirkaŭita per brakoj de miloj — kelkaj morgoj da tero restis al vi, kiuj apenaŭ por viaj tomboj sufiĉos dudek tagojn vi ne povos vin defendi.

— Kie viaj kanonoj, armiloj, nutraĵo, kaj fine kie kuraĝo?.. —
— Se mi estus vi, mi scias, kion mi farus. —

VIRO. Mi aŭskultas — rigardu, kiel mi estas pacienca.

PANKRACO. Do mi, Gr. Henriko, dirus al Pankraco: „Konsento — mi disigas mian taĉmenton, mian solan taĉmenton — ne iras helpi Sanktan Triunon — kaj pro tio mi restas ĉe mia nomo kaj bienoj, kies sendanĝerecon vi garantias al mi per parol' de honoro.“ —

Kiom da jaroj vi havas, Grafo? —

VIRO. Tridek ses, civitano. —

PANKRACO. Ankoraŭ dekkvin jarojn maksimume — ĉar tiaj homoj nelonge vivas — via filo pli proksima estas al tombo, ol al juneco — unu escepto ne malutilas al gigantaĵo. — Estu do la lasta Grafo sur tiuj ebenoj — regu ĝis la morto en domo de praavoj — ordonu pentri iliajn portretojn kaj skulpti blazonojn. — Kaj pri tiuj mizeruloj ne pensu plu. — La verdikto de l'popolo plenumiĝu super la mainobluloj. — (*plenigas al si duan pokalon*)

Je via sano, lasta Grafo. —

VIRO. Vi ofendas min per ĉiu vorto, ŝajne vi provas, ĉu mi povos min ŝanĝi en sklavon por la tago de via triumfo. — Ĉesu, ĉar mi ne povas vin rekompenci. — La providenco de mia parol' de honoro gardas vin. —

PANKRACO. Honoro sankta, honoro kavalira aperis sur la scenejo — velkita ĝi estas ĉifono en la standardo de l'honoro. — O! mi konas vin, trapenetras vin — vi estas plena je vivo kaj kunigas vin kun mortantoj, ĉar vi volas ankoraŭ kredi je kasto, je ostoj de praavinoj, je l'vorto *Patrujo* kaj tiel plu — tamen en profundo de l'koro vi mem scias, ke viaj kunfratoj meritas punon kaj post la puno forgeson. —

VIRO. Kaj vi kaj la viaj kion alian? —

PANKRACO. Venkon kaj vivon — nur unu leĝon mi aprobas kaj antaŭ ĝi kliniĝas — laŭ tiu leĝo la mondo kuras al ĉiam pli altaj sferoj — ĝi estas via pereco, kaj krias nun per mia buŝo:

„Putrintaj, vermoplenaj, plenaj je trinko kaj manĝo, lasu lokon al junaj, malsataj kaj fortaj.“ —

Tamen Mi deziras vin savi — vin solan. —

VIRO. Pereu senglave pro tiu kompato via! — Mi ankaŭ konas vian mondon, rigardis en la noktaj ombroj la dancojn de l'amasaĉo, sur kies nukoj vi rampas supren — vidis ĉiujn malnovajn krimojn de l'mondo vestitajn per novaj vestoj, en nova rondsaltantaj danco — sed ilia fino estos la sama, kiel antaŭ miloj da jaroj — diboĉo, malbon' kaj sango. — Kaj vi tie ne estis — vi ne bonvolis malsupreniri inter viajn infanojn — ĉar funde de l'animo vi malestimas ilin — kelkajn momentojn ankoraŭ, kaj se la prudento vin ne forlasos, vi malestimos vin mem. —

Ne turmentu min plu. — (*sidiĝas sub sia blazono*).

PANKRACO. Mia mondo ankoraŭ ne havas firman apogon — certe — ne elkreskis en giganton — soifas ĝis nun panon kaj komforton — sed venos tempoj... — (*leviĝas, iras al la Viro kaj apogas sin je la blazona kolono*).

Sed venos tempoj, en kiuj ĝi komprenos sin kaj diros pri si: „Mi estas“ — kaj ne troviĝos alia voĉo en la mondo, kiu povus respondi: „Mi estas“. —

VIRO. Kio plu? —

PANKRACO. El la generacio, kiun mi regas per la forto de mia volo, naskiĝos gento lasta, plej supera, plej fortika. — La tero ankoraŭ ne vidis tiajn virojn. — Ili estos homoj liberaj, ĝiaj sinjoroj de poluso ĝis poluso. — Ĝi tuta estos unu urbo floranta, unu domo feliĉa, unu laborejo de riĉaĵoj kaj industrio.

VIRO. Viaj vortoj mensogas — sed via vizaĝo senmova, pala — ne scipovas simul! inspiron. —

PANKRACO. Ne interrompu, ĉar estas homoj, kiuj surgenue min petegis pri tiaj vortoj, kaj mi tiujn vortojn al ili avaris. —

Tie ripozas Dio, kiu ne plu mortos — Dio per laboro kaj sufero de tempoj malkovrita el ŝirmiloj, — konkirita en la ĉieloj de propraj infanoj, kiujn iam Li disĵetis sur la tero, kaj ili nun ekvidis kaj ekkonis la veron — Dio de l'homaro rivelis sin al ili. —

VIRO. Kaj al ni, antaŭ jarcentoj — la homaro jam estas savita de Li. —

PANKRACO. Ĝi do ĝoju pro tia savo — pro la mizero de du jarmiloj, forpasantaj de Lia morto sur la kruco. —

VIRO. Mi vidis tiun krucon, blasfemanto, en malnova Romo — ĉe Liaj piedoj kuŝis gruzoj de pli potencaj fortoj ol la viaj — cent Dioj similaj al la via sternis sin en polvo, kapojn vunditajn levi ne kuraĝis al Li — kaj Li staris sur altaĵoj, sanktajn brakojn etendis orienten kaj okcidenten, frunton sanktan trempis en sunradioj — oni vidis, ke Li estas Sinjoro de l'mondo. —

PANKRACO. Malnova fablo — vanta, kiel tinto de via blazono. — (*frapas la ŝildon*)

Sed mi pli frue legis viajn pensojn. — Se do vi scipovas penetri en senlimojn, se vi amas la veron kaj serĉis ĝin sincere, se vi estas homo laŭ la modelo de l'homaro, ne laŭ nutristinaj kantetoj, aŭskultu, ne forpuŝu ĉi-tiun momenton de savo, morgaŭ postesigno ne restos de l'sango, kiun ni ambaŭ elverŝos — lastfoje mi al vi parolas — se vi estas tio, kio vi ŝajnis iam, leviĝu, forlasu la domon kaj sekvu min. —

VIRO. Vi estas pli juna frato de l'satano — (*leviĝas kaj promenas laŭlonge*) Vanaj revoj — kiu ilin plenumos? — Adamo mortis en dezerto — ni ne revenos en la paradizon. —

PANKRACO. (*flanke*) — Mi kurbigis la fingron sub lian koron — trafis nervon de poezio. —

VIRO. Progreso, feliĉo de l'homaro — mi ankaŭ iam kredis — jen! vi havas, prenu mian kapon, por ke nur... Farigis. Antaŭ cent jaroj, antaŭ du jarcentoj, kompromiso povis ankoraŭ... sed nun, mi scias — nun oni devas mortigadi sin reciproke — ĉar nun ili nur deziras ŝanĝi la generacion. —

PANKRACO. Ve al venkitoj — ne hezitu — ripetu nur unufoje „ve“ kaj venku kun ni. —

VIRO. Ĉu vi esploris ĉiujn erarvojojn del' Destino? — ĉu en videbla formo Ĝi stariĝis ĉe la eniro al via tendo nokte kaj per giganta mano benis vin — aŭ ĉu vi aŭdis Ĝian voĉon tagmeze, klam ĉiuj dormis en varmego kaj vi sola meditis — ke vi tiel certe minacas per venko, vi, homo el argilo, kiel mi, sklavo de iu ajn kuglo, iu ajn glavhako? —

PANKRACO. Ne lasu vin tromplogi per vanta espero — ĉar ne ekgratos min plumbo, ne tuŝos fero, kiom longe unu el vi rezistas al mia verko, kaj kio poste okazos, tio min ne plu interesas. —

(Horloĝo batas)

Tempo mokas nin ambaŭ. — Se vin enuigis la vivo, savu almenaŭ la filon. —

VIRO. Lia pura animo jam estas savita en ĉielo — kaj sur la tero patra sorto lin atendas. — *(klinas la kapon inter la manoj kaj haltas).*

PANKRACO. Vi rifuzis do? —

(Silento)

Vi silentas — meditas — bone — tiu meditu, kiu staras super la tombo. —

VIRO. For de misteroj, kiuj ekster la limoj de viaj pensoj okazadas nun en fundo de mia spirito. — La mondo de korpo al vi apartenas — grasigu ĝin per manĝo — ĉirkaŭverŝu per sango kaj vino — sed plue ne iru kaj for, for de mi. —

PANKRACO. Servanto de unu penso kaj de ĝiaj formoj, pedanta kavaliro, poeto, malglor' al vi — rigardu min — Pensoj kaj formoj estas vakso por miaj fingroj. —

VIRO. Vane, vi min neniam komprenos — ĉar ĉiu el viaj patroj enterigita estas kune kun amasaĉo, kiel senviva objekto, ne kiel homo kun forto kaj spirito. — *(etendas la manojn al la bildoj)*

Rigardu tiujn portretojn — la pens' pri patrujo, hejmo, familio. penso — malamiko via, sur iliaj fruntoj skribita estas per sulkoj — kaj kio en ili estis kaj forpasis, hodiaŭ vivas en mi. — Sed vi, homo, diru al mi, kie estas via patrujo? — Vespere

vian tendon vi starigas sur gruzoj de fremda domo, tagiĝe ĝin kunmetas kaj migras plue — ĝis nun vi ne trovis la hejmon kaj ne trovos, ĝis kiam cent homoj volos ripeti kun mi: „Glor' al patroj miaj“. —

PANKRACO. Jes, glor' al avoj viaj sur ter' kaj en ĉielo — efektive interesa vidaĵo. —

Tiu kastelestro, vilaĝaninojn pafadis sur arboj kaj judojn rostis vivajn. — Tiu kun stampilo en la mano kaj subskribo — „kanceliero“ — falsis dokumentojn, forbruligis arkivojn, koruptumis juĝistojn, per veneno plirapidigis heredaĵojn — de tio devenas viaj vilaĝoj, enspezoj, potenco. — Tiu, nigrulo, kun falsaj okuloj, adultis en domoj de l' amikoj — tiu, kun la ordeno del' ora ŝaflano, en itala kiraso, videble servis al fremduloj, — kaj tiu pala sinjorino, kun malhelaj bukloj, adultis kun sia paĝio — tiu legas leteron de l' amanto kaj ridas, ĉar la nokt' proksimiĝas, tiu, kun hundo sur la robrono, de l' reĝoj estis konkubino. — Jen viaj genealogioj sen interrompo, sen makulo. — Mi ŝatas tiun en verda ĉemizo — li drinkis kaj ĉasis kun la fratoj nobeloj, kaj vilaĝanojn elsendadis, por ke ili kun hundoj pelu la cervojn. — Stulteco kaj mizero de tuta lando — jen prudento kaj forto via. — Sed la tago de l' juĝo proksimiĝas kaj en tiu tago mi promesas al Vi, ke mi forgesos pri neniu el viaj Patroj, pri neniu gloro via. —

VIRO. Vi eraras, burĝa filo. — Nek vi, nek iu ajn el la viaj vivus, se ilin ne estus nutrinta la graco, ne defendus la potenco de miaj patroj. — Ili dum malsato disdonis al vi grenon, dum pesto konstruis hospitalojn, — kaj kiam vi el bestaro elkreskis je suĉinfanoj, ili al vi starigis sanktejojn kaj lernejojn — dum milito nur lasadis hejme, ĉar ili sciis, ke vi ne taŭgas sur kampo batala. —

Viaj vortoj rompiĝas sur ilia gloro, kiel iam sagoj de idoloj sur iliaj kirasoj — ili eĉ ne movos iliajn cindrojn — ili pereos, kiel hurletado de rabia hundo, kiu kuras kaj ŝaŭmas, ĝis ĝi mortaĉos ie sur vojo — kaj nun, jam tempo por vi forlasi mian domon. — Gasto, libere mi ellasas vin. —

PANKRACO. Ĝis la revido sur la reduto de Sankta Triunuo. — Kaj kiam al vi mankos kugloj kaj pulvo...

VIRO. Tiam ni proksimiĝos je l' distanco de niĝj sabroj. Ĝis revido. —

PANKRACO. Du agloj ni estas — sed vian neston frakasis fulmo. — (*prenas la mantelon kaj la ĉapon de Libereco*)

Trapasante ĉi-tiun sojlon mi ĵetas sur ĝin malbenon, konvenan al maljuneco. — Kaj vin kaj vian filon mi destinas al detruo. —

VIRO. Hej, Jakobol! —
(Jakobo eniras)

Forkonduku ĉi-tiun homon ĝis niaj lastaj gardoj sur la
 altaĵo. —

JAKOBO. Tiel min helpu Disinjoro. — *(eliras)*

El la pola lingvo tradukis
 Br. Kuhl.

Miesiąc esperancki.

W ruchu esperanckim w pierwszych rzędach obecnie kroczą czesi, pojmując doniosłość Esperanta dla propagandy, którą umieją się świetnie dla celów swych posługiwać i tym atutem biją tych, którzy ten znakomity czynnik porozumiewawczy lekceważą. Wraz z czechami kroczą w Czechach Niemcy.

W Genewie na odbytym w kwietniu r. b. zjeździe delegatów, reprezentujących wieloliczne towarzystwa esperanckie najrozmaitszych narodowości K. R. w powszechnym związku esperanckim U. E. A., angielski komitet dla celów języka międzynarodowego za pośrednictwem Edmondsa zaproponował powtórzenie eksperymentu zapoczątkowanego przez S. R. Marshalla podczas wojny. A mianowicie — mają być założone kursy esperanckie dla urzędników i handlowców rozmaitych gałęzi handlu w licznych krajach podczas jesieni roku bieżącego. Kurs ma trwać 3 miesiące, liczba godzin przeznaczonych na naukę 25; kursy te mają się odbywać pod zwierzchnictwem i kontrolą Izby Handlowych i jakiejś poczytnej gazety, i mają one być umiejętnie rozreklamowane. Po skończeniu kursów kursисти mają się porozumiewać w języku Esperanto w sprawach handlowych z towarzyszami pracy z rozmaitych krajów celem udowodnienia, jak pewnym i niezbędnym środkiem porozumiewawczym jest Esperanto. Izby handlowe Paryża, Londynu i Medjolanu zajmą się organizacją sprawy. Kierunek pracy nadaje Edmonds. Wybrana została komisja dla przeprowadzenia sprawy. Do komisji weszli: z Anglii Edmonds, z Austrii Schade, z Czechosłowacji Scholtze, Pitlik i Hromada, z Francji Poncet, z Niemiec Ellersiek, z Węgier Balkanyi, z Włoch Stromboli i Toschi, z Polski Grenkamp, ze Szwajcarii Borel i Spielman. Niewątpliwie Towarzystwo Esperantystów Polskich sprawą propagandy i urządzenia kursów dla handlowców Polaków się zajmie.

Przygotowawcza konferencja dla celów międzynarodowego porozumienia w sprawach radjotelegraficznych, odbyta w kwietniu r. b. w Genewie, wyraziła w następujących słowach sformułowane życzenie: „Skonstatowawszy, że radjotelefon rozpowszechnia mowę ludzką po za wszelkie granice i że jedyną tylko napotyka przeszkodę — różnojęzyczność narodowości, sądzi, że niezbędnym jest wprowadzenie i użycie pomocniczego języka międzynarodowego w stosunkach pomiędzy obcemi sobie językowo krajami, które rozpoczęły się porozumiewać w Europie i Ameryce w języku Esperanto i które zainicjowały radjotelegraficzne kursy tego języka, dalej konferencja wyraża życzenie, aby wszystkie radjostacje przeznaczyły regularnie przynajmniej raz w tygodniu jeden wieczór na porozumiewanie się w języku Esperanto, jakoteż na kurs tego języka, gdyż Esperanto okazał się łatwym, łatwo uchwytnym dla ucha i jest już bardzo rozpowszechnionym w licznych krajach.

Komuniko.

La Samideanoj, kiuj, veturante al Wien, aŭ revenante el la kongreso, havas la intencon viziti Varsovon, aŭ iun alian polan urbon, estas kore petataj informi la Asocion pri la dato de sia trapaso en tiun aŭ alian urbon. Tiu informo estas nepre necesa ĉar pro la somera sezono, multaj esperantistoj estas for el la urboj.

**Adreso: Pola Esperanto Asocio,
Królewska 19, Warszawa.**

Zarząd Pol. Tow. Esp. w Warszawie zawiadamia swych członków, że zebrania odbywają się co czwartek od 8-10 wiecz. w lokalu Tow., Królewska 19. Kancelarja i biblioteka czynne są o tej samej porze.

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

Redakcio kaj administracio: Warszawa, str. Królewska 19.

Funkcias nur lunde kaj jaŭde de 8—10 h. vespere.

Presejo: EDMUND KOKORZYCKI, ŁÓDŹ, Podleśna 26.

LUGU LA GAZETON

„ESPERANTO TRIUMFONĈA”

Semajna

Aktuala

Ilustrita



Grandformata



Senpagaj monataj aldonoj:

„REVUO”

(literatura kaj popolscienco)

„INTERNACIA KOMERCO”

Administracio:

HORREM BEI RÖLN, GERMANLANDO

OD ADMINISTRACJI.

Prenumerata roczna **ESPERANTYSTY POLSKIEGO** wynosi 6 złp. Do numeru niniejszego załączamy czeki P. K. O. z prośbą o wpłacenie należności.

**Czytajcie i Prenumerujcie
Miesięcznik Ilustrowany**

Lot Polski

jest jedynem pismem lotniczem,
wydawanem przez Ligę Obrony
Powietrznej Państwa Polskiego
pod redakcją

pptk. J. Grzędzińskiego.

„Lot Polski“ daje przegląd
lotnictwa i jego zagadnień w kra-
ju i zagranicą.

**Redakcja i Administracja:
WARSZAWA, NOWY ŚWIAT 14.**

.....

**Prenumerata roczna 7 złp., kwart. 2 złp.
numer pojedynczy 85 gr.**

**Jarabono de POLA ESPERANTISTO (12 numeroj)
en kaj eksterlande 6 złp. (6 orfrankoj)**

Redaktoro kaj eldonanto: STANISŁAW KAROLCZYK

Presejo: Edmund Kokorzycki, Łódź, Podleśna 26.